

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

La 49-a Zamenhof-festo en Kanagaŭa

Dato: 2019-12-08 (dimanĉo) 13:30-16:40

Loko: En la kvar-etaĝa ĉambro de la Civitana
Kultura Halo en Urbo Ĉigasaki

Kotizo: 500 enoj

Kanagaŭa Esperanto-Ligo, kun 4 rondoj inkluzive de Jokohamo, okazigis la Zamenhof-Feston, kun jena programo. Venis entute 29 personoj.

Programo

(13:30 malfermo)

1. Pri Azia-Oceania Kongreso en Vjetnamio:
IWAYA Mituru
2. Postkongreso de UK en Finnlando: DOI Ĉieko
3. Elektronika versio de Esperanto-Japana
Vortaro: SIBAYAMA Zyun'iti
4. Libro-prezentado (en la japana lingvo):
MIYAZAKI Hideko

(14:50-15:10 ripozo)

5. Plano de Esperanto-Muzeo
(en la japana lingvo): DOI Hirokaz
6. Kantoj [Nia kanto, Donu al ni Pacon,
Ĝis la revido Kara Amikaro]:

Korusa grupo de Hama-rondo

7. Prezento de ĉiu rondo: Odaŭara Fuĵisaua,
Jokohamo, Kaŭasaki (per organo)
8. Pormemora Fotado
9. Transdono de la Esperanto-Standardo de
Kanagaŭa Esperanto-Ligo el Fuĵisaua (ĉi-jara
respondeculo) al Odaŭara (respondeculo en
2020)
10. Kanto de la Himno, La Espero.
(16:40 fermo)

Nia Plano

([KK]=nia kutima kunvenejo, nome Kanagawa-Kenmin-Sentaa, proksime de la Stacidomo Jokohama)

*jan. 26 [KK] La jarkunveno de nia rondo "NPO Esperanto Jokohama". Ni aprobas jenajn dokumentojn: la raporto pri agado kaj kaso en 2019, plano kaj buĝeto por 2020. Ĉi-foje ni esperas pli konkrete bildigi la planon fondi Esperanto-Muzeon en nia urbo.

Pli pri la 106-a Japana Esperanto-Kongreso



En la lasta, novembra n-ro, ni prezentis 2 eseojn pri la 106-a Japana Esperanto-Kongreso, okazinta en Saitama, planita de la 12-a, sed efektive de la 13-a ĝis la 14-a de oktobro 2019. En tiu ĉi n-ro, Namba Fumiharu aldonas noton pri karea restoracio vizitita survoje al la kongresejo.

Nu, post la kongreso troviĝis ankaŭ epizodoj, kaj ĉi-numere ni publikigas eseeton pri tio. (redakcio)

Teejo post la Kongreso

Sibayama Noriko

En la 14-a tago post la Fermo ni volontuloj okazigis ekskurseton. Ni vizitis japanan teejon Rafu, kie LKK-anoj kunsidis kelkajn fojojn antaŭ la JEK. En la dua etaĝo de Rafu oni montras argilajn ceramikaĵojn memfaritajn. En la unua



verda teo kun glacio kaj dolĉaĵo

etaĝo estas tabloj kaj seĝoj, kaj oni servas japanan teon kaj kukon. Ni 14 membroj sidiĝis ĉirkaŭ ronda tablo, kaj havis te-servon. La mastro scivolis ĉu la JEK okazis aŭ ne. Ni klarigis, ke la programo de la unua tago nuliĝis sed ni iel okazigis, kaj pli ol 200 homoj kolektiĝis. Do la mastro ege ĝojis kaj la edzino de la mastro fotis nin. La mastro rakontis la historion de la teejo.

Antaŭ cent sesdek jaroj samurajo perdis laboron. Pro tio registaro rekomendis samurajon kulturi tefoliojn. Tamen Urawa estas ebena, sen maro, sen monto, kaj ne taŭgas por kultivi tefoliojn. Tial te-kampo malaperis en Urawa kaj nur restis la teejo, kiu enportas tefoliojn el Sayama kaj aliaj. La mastro emfazis, ke tebotelo el aŭtomato ne estas teo.

Supo-Kareo amata de Akihabaranoj

(Suplemento por mia raporto en n-ro 353)

Namba Fumiharu

Nuntempe, japanstila kareaĵo "Kare-Raisu" (Kareo kun Rizaĵo) estas tute konata kaj ŝatata kiel nacia kuraĵo de Japanio. Unu el la variaĵoj "supo-kareo" konatiĝis en Sapporo (Hokkaido) kiel loka kuirarto. Ĝi estas spica karea supo kiun oni preparis laŭ la orienta tradicia medicino. Ĝi manĝatas kun rizaĵo same kiel Kare-Raisu, tial la nomo estas ne karesupo sed "supo-kareo".

Je la januaro de 2011, tre malgranda restoracio de supo-kareo "Kamui" malfermiĝis najbare de famkonata hobiista kvartalo Akihabara en Tokio. La mastro s-ro Morohashi estas eksa redaktisto, kaj li bone konas diversajn kulturaĵojn de Akihabara. Tial tie li komencis la manĝejon por supo-kareo, la kuirarto de lia naskiĝloko. Lia supo-kareo bonege plaĉas al multaj fanoj de Akihabara kulturo. Lastatempe la restoracio translokiĝis al pli granda ejo, kaj nun pli multaj Akihabaranoj gustumas la kareon.

En la supo-kareejo Kamui, s-ro Morohashi ofte okazigas diversajn "Kunlaborajn Eventojn" kun verkaĵoj kiel mangaoj, "malpezaj" noveloj, komputilaj ludoj ktp. La mastro Morohashi ĉiam planas kaj servas specialan aranĝon de supo-kareo laŭ la koncepto de propra "kunlabora" verkaĵo. Li jam kelkfoje okazigis eventojn ankaŭ pri komputila ludo Kotonoha Amrilato, kiu akceptis la lingvon Esperanto

por utiligi kiel alimonda lingvo "Juliamo". Pro tio, s-ro Morohashi jam sufiĉe komprenas pri la koncepto de Esperanto, kaj li eĉ konas kelkajn esperantistojn.

Ĉu vi gustumu la supo-kareon de s-ro Morohashi? Lia restoracio situas en Sudacho, kvartalo ĉe suda flanko de la rivero Kandagawa apud Akihabara. Por detaloj, bv. serĉi rete per la nomo "Soup Curry Kamui", aŭ kontakti al lia Twitter: @morokamui



"Kareo de Diabla Tomato"

Specialaĵo por Kotonoha Amrilato.

(Tiel nomata ĉar la infana heroino Ruka tre malŝatis tomaton kvazaŭ ĝi estus diablo)

el Ŝanhajo

Matene de la 16-a de novembro 2019 oni okazigis la kunvenon Ba Jin kaj Esperanto en la Ŝanhaja Fremdlinga Universitato. La prezidanto de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio S-ro Zhou Tianhao prezidis la kunvenon kaj la honora prezidanto Wang Minhao raportis pri Ba Jin kaj Esperanto. Ĉirkaŭ 20 geesperantistoj de Ŝanhajo partoprenis en la kunveno. Ji Yingeng (la persono kun nigraj okulvitroj)



Elektra Skotero

Mizro Iwaya

Kiam mi iris al Helsinko en lasta julio, mi trovis strangan sed oportunan veturilon sur strato. Mi scias ke antaŭ dekoj da jaroj oni ekvendis rultabulon nomatan Kickboard en Japanio. Ĝi ne havas motoron kaj rajdanto devas puŝi ĝin mem per piedo. La veturilo en Helsinko estis io alia. Ĝi havas motoron kaj oni ne bezonas piedpuŝi ĝin. Mi estis fascinita de ĝi.

Kiam mi iris al Berlino, mi refoje trovis ilin abunde sur strato. Ĉifoje mi registris min kiel uzanton per mia poŝtelefono. La unua uzo estis iom komplika kaj ĝena (ĉiu komenco estas malfacila), sed post tio mi povis facile uzi ĝin sen problemo. La stratoj en Berlino estas larĝaj kaj maldense okupataj. Krom tio ni povas ofte trovi biciklan koridoron inter aŭta kaj piedira vojo. Do bicikloj kaj skoteroj estas pli facile uzeblaj en Berlino.

Mi povis facile trovi forlasitajn skoterojn sur la strato. Precipe ĉirkaŭ turismejoj oni povas trovi plurajn forlasitajn skoterojn tuj apude. Mi prenis unu el ili kaj enregistriĝis per poŝtelefono, kaj ekkuris sur ĝi. La maksimuma rapideco estis 20km/h. Tio signifas ke mi povis atingi la cellokon en kvinona tempo de piediro. Facila kapto kaj rapida atingo estas du avantaĝoj de la e-skotero. Kiam mi atingis la cellokon, mi povis

simple forlasi ĝin ĉe la stratangulo. GPS zorgas pri la sekvantaj uzantoj.

Antaŭ kelkaj jaroj mi fojfoje trovis starveturilojn (segway) en certaj establejoj. Sed lastatempe mi ne vidas ilin. E-skoteroj estas troveblaj tie. Ili estas pli malgrandaj kaj malmultekostaj.

La kosto varias laŭ la uzmaniero, sed mi povas diri ke la mezuma prezo por 1km estas ĉirkaŭ du eŭroj. Ni komparu ĝin kun taksio. Eble la kosto estas ĉirkaŭ ĝia duono. Do, ni povas konkludi ke mallonga kaj malmultopa veturado estas adekvata por elektra skotero. Mi bedaŭras ke ĝi ne estas laŭleĝa en Japanio.



Beletro

Rakonto pri 100 verkistoj — Leĝo de la urbeto Poriko —

Verkis OOTA Hiroya / Tradukis KOYAMA Takesi

(5)

Nu... nesciante ke urbanoj de Poriko tiel interŝanĝis opiniojn pri la verkistoj, ĉiuj 100 verkistoj absorbite verkadis antaŭ sia skribotablo, kantis jene: “Nek rizo, nek mono plej gravas en la mondo, sed koro inter homoj.” — forgesante kaj malsaton kaj senmonecon.

Eĉ se ili ricevus ian ajn kalumnion, por la 100 verkistoj verki rakonton estas ilia propra vivo. Jes, ĝi estas pli grava tasko ol ilia vivo.

Tial la 100 verkistoj, kun la espero “— Se tiu ĉi rakonto ĝojigos la koron eĉ de nur unu persono, tio estos tre bona.” — tenas la bruston saltanta, kaj diligente produktadas sian rakonton eltenante vivosuferon kaj kalumniojn.

Kompreneble eĉ se unu el la 100 rakontoj povu kuraĝigi ne nur ordinarulojn sed ankaŭ la koron de iu “elreviĝinto”, “malĝojulo” kaj “enuiĝinto”!

Por la 100 personoj verki rakonton estas tiel grava deziro, ke ili ne bedaŭrus interŝanĝi sian vivon kontraŭ rakonto verkita...

Kaj de tiam la urbanoj de Poriko denove diligente diskutis, ja en la vera diskuto, kaj faris la faman leĝon de la urbo Poriko. Sed ne miskomprenu, ke “la fama” validas nur en tiu ĉi rakonto.

(6)

—La fama leĝo de la urbeto Poriko

La unua artikolo :

Se 10 personoj sentis pri rakonto jene,
— Ha, absurda! Tiu rakonto estas tute ne leginda. — la verkisto de la rakonto devas demeti ĉapelon de sia kapo kaj peti pardonon de ili. (“He! Nur tiom?” — aŭdiĝis ies voĉo.)

“Vere, mi sentis, ke estas bagatele.” unu diris.

“Estus senutile, se oni ricevus nur la pardonpeton. Mi ne volas vidi tian ĉapelon.

—Ni estas okupitaj, ĉu ne? Antaŭ ĉio ni devas ricevi de la verkisto la konsumitan tempon por legi la bagatelan rakonton.”

“Jes, certe!” — Ankaŭ alia diris brave.”

“Ni estas viktimoj. Unuvorte ni estas trompitaj

per la rakonto de la verkisto, tial ni devas ricevi la kompencon de la tempo perdita. Ĉi-okaze la verkisto devas plenumi sian devon por leganto.”

“Ho! Vi uzis tre malfacilajn vortojn, sed tio estas ĝusta. Jes, tio estas la dialektiko por verkisto.” — Diris la edzino de la urbestro.

“Ĉiuokaze ni devas studi la leĝon pri la kompenso pro damaĝo. Kaj miaj damaĝoj...” — La edzino pensadis ion kalkulante per siaj fingroj. Poste ŝi murmuris bedaŭre.

“Se mi ne konsumus tempon por tia senenca interparolo, mi jam finus mian taskon!”

“Se mi havus tiun tempon, mi jam finlavis 5 malpurajn antaŭtukojn kaj 25 vindaĵojn por bebo...”

Alia diris: “Aha. Se la perdita tempo valoras tian damaĝon, ankaŭ la leĝo pri la kompenso de verkisto iĝas klara...”

Rezulte de la diskutado, la dua kaj la tria artikoloj de la leĝo de la urbeto Poriko fariĝis.

La dua artikolo:

La verkisto, kiu verkis bagatelan rakonton, devas peti de la ĝenita leganto pardonon kaj devas redoni al 10 legantoj la konsumitan tempon.

La tria artikolo :

La verkisto devas viziti 10 legantojn por redoni ilian perditan tempon kaj devas lavi 5 antaŭtukojn malpurajn kaj 25 vindaĵojn por bebo. (Noto: li devas uzi sian sapon.)

Nu... Post la leĝo deklamita, la verkistoj verkis nur unu rakonton por 10 tagoj, ĉar ili ektimis verkadi. Sed malgraŭ tio ili de tempo al tempo malsukcesis, nome verkis bagatelan rakonton por pasigi la tempon. Tial en la urbeto Poriko kvazaŭ 100 lavejoj samfoje malfermiĝis. Por tio antaŭtukoj kaj vindaĵoj mankis en lavejoj. La urbanoj petis lavi al 100 verkistoj ne nur antaŭtukojn kaj vindaĵojn, sed ankaŭ diversajn lavaĵojn, mi aŭdis tiel.

(fino)